

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

Ĵaŭde la 16-an de aprilo 2020 per Skype

(protokolo aprobita la 28-an de majo 2020)

Partoprenis:

Amelie Matt kaj Mario Machlik en Tromsø
Herman Ranæs kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Lars Sandbakk en Stavanger
Bård Hekland en Bergen
Claude Rouget en Gotland

La interkonsiliĝo komenciĝis je 20:30 kaj finiĝis je 21:50.

0. Tagordo

Al la propono dissendita 13.04.20 estis aldonitaj du pritraktindaĵoj por Eventualaĵoj. La tagordo estis aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 12-an de marto

Aprobita.

2. Ekonomio

Pasintkunside, Mario taskiĝis eltrovi, kiam kaj kion decidis la Landa kunveno pri apogo de NEL al NJE. Ne retroveblas tia decido. Claude por 2019 kaj 2020 elpagis la saman sumon kiun faris Anne Karin en antaŭaj jaroj, NOK 2500. Decido: Ni faros same por 2021 kaj eventuale fiksis procentaĵon en la sekva Landa kunveno.

Claude proponis, ke konto 7877.06.79590 estu ŝanĝita al altintereza konto por la deponaĵoj de kluboj. Neniu kontraŭis. Mario ordigos tion kun la banko kiam denove viziti ĝin en Tromsø, verŝajne aŭtune.

Kelkaj kluboj deponis monon ĉe NEL pro manko de loka aktivado. Decido: NEL povas teni monon por kluboj, sed nur se la mono restas netuŝata. Se lokaj kluboj volas uzi la monon, ĝi estu en alia konto, kiun disponas klubano(j), ne la kasisto de NEL.

La estraro proponas, ke la mono de Bryne estu transpagata al la kluba konto de Stavanger. En praktiko, tiuj formale du kluboj nun funkcias kiel unu. Lars diskutos la proponon kun la Bryne-anoj.

3. Jarraporto 2019

Pro mankanta kapacito ĉe la sekretario, Mario pretigos malnetan jarraporton kaj dissendos al la estraro por diskuto. Ĝi estu preta en la aŭtuno, ne estis fiksitaj konkreta limdato, kaj estos aprobita en la Landa kunveno 2021.

4. Landa kongreso, skandinava kongreso 2021

Estas planata komuna skandinava kongreso de la 14a ĝis la 16a de majo 2021 en Elsinoro, Danujo. Ekestis retroŝta diskuto, kion NEL faru pri la Landa kongreso, kiu okazu samjare. Mario laŭtlegis mesaĝon de Otto Prytz, kiu argumentis, ke la Landa kongreso okazu kadre de la skandinava.

La estraro diskutis la aferon kaj proponas kombinitan aranĝon: Ĵaŭde la 12-an: Landa kunveno en Oslo (en Esperantonia, Haraldsheimen aŭ alia taŭga loko). Kongresa vespermanĝo. Ebleco partopreni rete. Vendrede la 13-an: Vojaĝo al Elsinoro. Se estos intereso: Antaŭtagmeza ekskurseto por tiuj kiuj ne pluiros. Sabate la 14-an: NEL-sesio dum la du aliaj landaj organizoj faros sian jarkunvenon (09-11). Krome ordinara programo. Dimanĉe la 15-an: La kongreso finiĝos je la 13a.

Mario prezentos nian proponon/decidon al la Oslo-klubo.

5. Asekuro de Esperantonia

Ni pagas preskaŭ 5000 kronojn en asekuro por la internaj havaĵoj de Esperantonia. Ĉu tio indas?

Decido: La estraro volas asekuron, sed nur por la reala valoro de la havaĵoj. Mario esploras ĉe IF la kondiĉojn kaj petos rabaton. Eventuale, li petos oferton de alia(j) kompanio(j).

6. Libroj de Anne Karin

Anne Karin postlasis ĉ. 120 kilogramojn da libroj. Unu valizo estas jam sendita al Oslo, kelkaj libroj fordonitaj al rogalandanoj. Kion fari pri la resto? Lars faris kompletan liston. Estas plejparte lernolibroj kaj faklibroj, malpli da beletro.

Decido: Oferti al membroj librojn senpage, kontraŭ la afranko, per NEL-inform kaj notico en NE-isto. Respondecos Lars. Sama oferto al svedoj kaj danoj venontjare, ili povas ricevi la librojn dum la skandinava kongreso. Ni povas ankaŭ sendi librojn al interesatoj en malriĉaj landoj, sed multaj verkoj ne estas aktualaj, kaj la afranko limigas kiom eblas sendi.

7. Eventualaĵoj

Internacia kunlaboro

Ĉu NEL estigu kunlaboron kun esperantistoj en foraj landoj? Diskutigis la estraron Lars, kiu lastatempe havigis multajn novajn kontaktojn, inter alie en Afriko, Orienta Timoro kaj Suda Koreujo. I.a. li provas eki iun prikomputilan kunlaboron.

Decido: NEL kiel organizo ne havas kapaciton mem iniciati aŭ plenumi tiun laboron. Nia prioritato estas vivtenigo de la landa asocio mem kaj kunlaboro kun najbaraj landoj. Tio ne kontraŭas, ke lokaj iniciatoj por organizita kunlaboro kun alilandaj esperantistoj estas bonvenaj.

Membreco en la studasocio «Næring og samfunn»

NEL pagas 2000 kronojn por membreco. Atentigis Douglas en retmesaĝo datita 16.04.20, ke ni ĉi jare eble ne sukcesos organizi sufiĉe da kunsidoj por vere profiti de tiu membreco. Ĉu ni malmembrigu?

Decido: NEL restu membro de «Næring og samfunn». Herman esploras la kondiĉojn por lokaj kaj perretaj kursoj. Ĉu eblas, sen troa fortostreĉo, registri ankaŭ aliajn klubkunvenojn, kaj eble eĉ la estrarajn kunvenojn, kiel kursoj laŭ la studplano «Esperanto konversasjon»?

Venonta estrara interkonsiliĝo

Okazos ĵaŭde la 28-an de majo je 20:30 per Skype.

Protokolis Bård Hekland